



4(158)
2016

Apudvistula Bulteno

de Krakova Societo ESPERANTO

Bultenon redaktas: Ĉiuj anoj de Krakova Societo ESPERANTO,
Adreso por korespondi: str. Sokolska 13, 31-515 KRAKÓW



Jubileaj XXX-aj Esperantaj Tagoj de Krakovo (3 – 5.06.2016)



Programo

Vendredo, 3.06

Kulturdomo „Podgórze”, str. Sokolska 13

09:30	Akceptado de partoprenantoj kaj disdonado de materialoj.
11:00 – 11:40	Inaŭguro.
11:40 – 12:30	Alicja Sacha – Skizo pri agado de KSE
12:30 – 13:30	Anastazja Dądela, Grażyna Porada – Prezentado de manĝ-suplementoj el fimao Betterware
13:30 – 15:00	P a ŭ z o
15:00 – 16:00	Andrzej Kołpanowicz – Matejko
16:00 – 17:00	Adam Łomnicki – La esperantaj vortaroj ĝeneralaj kaj sciencaj
17:00 – 17:30	Magda Tatara – Pri la sporta vortprovizo
17:30 – 18:00	Tomasz Chmielik – Promocio de „Pupo” en esperanta traduko
18:00 – 19:00	Zbigniew Duda – Antikvaĵoj de la Krzeszowice-Tero
19:00 – 20:00	La muzikkoncerto: norvega orkestro Roros Janitsjarorkester

Sabato, 4.06

Kulturdomo „Podgórze”, str. Sokolska 13

09:00 – 10:00	Tomasz Chmielik – Chełm – la juda urbo de stultuloj el la tuta mondo
10:00 – 11:00	Lidia Ligęza – Pri esperantaj versioj de nomoj kaj sakroj en dramoj de Witkacy „En la eta biendomo” kaj „Ŝuistoj”
11:00 – 12:00	Piotr Nosek – 80 000 kilometrojn ĉirkaŭ la mondo
12:00 – 12:30	Elżbieta Karczewska – Esperanto sur la pola listo de nemateria kultura heredaĵo
12:30 – 13:30	Elżbieta Karczewska – Mia vojaĝo tra Nepalo
13:30 – 15:00	P a ŭ z o
15:00 – 16:00	Marketa kaj Adam Wilkus – Pri la Sveda E-Kongreso sur la pola marbordo
16:15 – 16:45	Adam Wilkus – Malfermo de la ekspozicio pri vivo kaj agado de esperanta artistino Jadwiga Gibczyńska
17:00 – 18:00	Julia kaj Joachim Kołpanowicz – Koncerto de la klasika muziko
18:00 – 18:30	Anna Ramza recitas poemojn pri Krakovo
18:30 – 19:30	Jaga Wrońska kantas, Irena Urbańska recitas, Jacek Bylica akompanas fortepiane – Koncerto „Kanto pri la tero nia”

Dimanĉo, 5.06

09:30 – 11:00	Promenado tra urbo el Placo al J. Matejko
11:00 – 12:00	E-sankta meso en preĝejo de Patroj Franciskanoj, Placo al Ĉiuj Sanktuloj, Itala Kapelo
12:30 – 13:45	Galerio de Ortodoksa Arto (Nacia Muzeo), en Palaco de Erazm Ciołek, Kanonicza-str. 17

Aforismo – la konciza saĝo de nacioj

Aforismo laŭ la antikva kompreno estas konciza, sensoriĉa eldiro esprimanta principon aŭ penson rilatantan al scienco, arto, moro aŭ kredo, ekz. Hipokrato esprimis sin en aforismoj. Nuntempe la nocio aforismo ne estas komprenata tiom strikte. Ĝi povas rilati al aferoj ne tiel majestaj kaj noblaj.

Komence de XIX jarcento oni aplikadis la nocion "aforismo" al iuj formoj de verkado havantaj malfacilajn por difini ecojn. En la jaro 1841 pola filozofo Bronisław Trentowski karakterizis ĝin kiel "frazojn pri tia aŭ alia afero sen la arkitektura devigo, kvazaŭ pretervole diritan". Tamen oni povas apartigi kelkajn ecojn de aforismo. Jen ili:

MEMSTARECO: ĝi sen la preparo aperas en la muto kaj ne zorgas pri tio, kio eventuale povus okazi poste.

KURTECO: ĝi postulas formuli la penson eble plej mallonge, maksimume en du aŭ tri frazoj.

KOMPAKTECO: ĝi devas rezigni de ĝiaj troaj vortoj.

MULTSIGNIFEKO: ĝi permesas ne apliki la laŭvortan sencon; en la interesa teksto kaŝas sin la dua senco, pli grava ol ĉi laŭvorta; ju pli multe da signifoj, des pli multe da interpretaj eblecoj.

UNIVERSALECO: sen la tempa limigo aforismo aplikas nur la nunan tempon, kio certigas al ĝi la eternan aktualecon.

HUMORO: ĝi evitas seriozecon, volonte aplikas elementon de surprizo, proponas ludon, kiu apogas je teneraj riproĉoj trans ironio ĝis vere venena sarkasmo.

Iuj opinias, ke aforismo estas tiel malnova, kiel literaturo, aŭ eĉ tiel malnova, kiel la homaro mem. Aforismojn ni renkontas jam sur egiptaj papirusoj de antaŭ tri mil jarojn, sur babilonaj tabletoj kun la kojnoforma skribo kaj en libregoj de la Malnova Testamento. Majstroj de aforismo estis antikvaj hindoj, kiuj opiniis, ke "lango ne lango estas, sed nur peco de viando, kiam ĝi ne scipovas eldiri saĝajn sentencojn". Estimon por aforismoj montras ĉiuj nacioj de Oriento. Ĉinoj diras, ke "maksimojn de saĝuloj kaj sanktuloj estimas dioj, kaj demonoj estas al ili obeemaj". Por japanoj aforismoj estas "brilantaj inter krepusko de nokto lanternoj". Persoj kaj araboj komparas ilin al "la plej aromaj floroj el ĝardenoj de poezio".

La eŭropa literaturo ankaŭ aprezas ĉi formon. La unuaj grekaj filozofoj, ekz. Eraklito el Efezo, volonte transdonadis siajn pensojn ĉi forme. Tiun "oron de la klasika intelekto" transportis al nia tempo Erasmo el Roterdamo.

Ĉiu el literaturoj eŭropaj posedas elstarajn reprezentantojn de tiu ĝenro, preskaŭ ĉiuj literaturistoj kaj pensuloj volonte ĝin kultivas. Pola klasikulo de tiu ĝenro fariĝis ne nur sur la gepatra grundo Stanisław Jerzy Lec, tre alte taksata ankaŭ surmonde. Estis kaj estas aliaj aforismuloj, ekz. granda grupo el diversaj polaj literaturaj centroj, kiu ĉiujare renkontiĝas en Kulturdomo "Podgórze", por interŝanĝi la spertojn kaj tralegi al la kolegaro siajn verkojn. Mi dufoje partoprenis en tia interesa renkonto. Agas en ĉi grupo ankaŭ nia kolegino, esperantistino Urszula Zybura de Kalisz, kies malgrandajn verketojn ni havis okazon admiri dum esperantaj renkontoj kaj en "Apudvistula Bulteno".

Ekzemploj de la pola, aforisma verkado de mi cititaj devenas el antologio de pola aforismo "Pikilo kaj mielo de saĝo" (Żądło i miód mądrości) Vroclavo, 1990 kaj ampleksas diversajn tempoperiodojn de la pola literaturo:

Aleksander Fredro (1793 – 1876)

Ne ekzistas pli granda ĝojo por stultulo ol trovi pli grandan stultulon ol si mem.

Se neniu diros al vi, ke vi estas stulta, pro tio vi saĝa ne estos.

Foje moraligisto estas kiel kamenpurigisto; li purigas kamenojn, kaj mem estas malpura.

Sur la mondo – kiel sur foiro: pli bone tiu vendiĝos, kiu sin trotaksas ol tiu, kiu subtaksas...

Li amas sin mem, vere ne havas la kaŭzon.

Ju pli en tempon, des pli multekosta amindumado.

En aro de virinoj la plej facile trovi parolanton kaj la plej malfacile aŭskultanton.

Henryk Sienkiewicz (1846 – 1916)

Virinoj ne pardonas al viro erarojn, kiujn ili mem faris.

Pli honore estas por virino havi ĉe la piedoj leonon ol mopson.

Li scipovis rezisti nur al tiuj allogoj, kiujn li ne havis.

Historio instruas, ke la plej malbona tirano estas tia reganto, kiu en unu persono estas demono kaj stultulo.

Libero estas rajto fari tion, kion oni volas kaj obstakli al aliuloj fari tion, kion ili volas.

Kazimierz Przerwa-Tetmajer (1865 – 1940)

Faru hodiaŭ, kion vi planas fari morgaŭ; diru morgaŭ, kion vi planas diri hodiaŭ.

Virinoj atakas are, kiel kornikoj.

Melankolio estas patrolando de penso.

Maryla Wolska (1873 – 1930)

Korvo al korvo okulon ne forbekos, sed ŝatas, kiam tion faros iu alia.

Ne ĉiu, kiu havas malsanan hepaton estas Prometeo.

La homa penso estas kiel muŝo: eksidas sur ĉio.

Kritiko estas venĝo de nefekundaj mensoj superkreopovaj.

Nenio tiom kortuŝas viron kiel larmoj de virino, kiun li komencas ami kaj nenio tiom lin kolerigas kiel larmoj de virino, kiun li ĉesas ami.

Se homoj ĉesas sin koni, evidente ili tro bone ekkonis sin reciproke.

Karol Irzykowski (1873 – 1944)

Estas kriplaj tabloj de konvinkoj, sub kiuj tre volonte oni submetas – Biblion.

Stulteco – estas ankaŭ iu maniero uzi la menson.

Ne doloras min stultaĵoj, kiujn mi jam faris, sed tiuj, kiujn mi ankoraŭ planas fari.

Sinjoro Dio kreis la mondon kaj poste komencis per ĝi ludi.

Kritikisto – kloroformas per laŭdoj kaj poste operacias.

Kato ne rezignas de muskaptado malgraŭ ke oni eltrovis kaptilojn.

Situacio, direktoro de furiozuldomo estas de ili malliberigata kaj kuracata ofte ripetiĝas kaj apartenas al unua akto de historio.

En politiko anstataŭ ludi, senĉese oni miksas ludkartojn.

Kial oni povas diri nenian veron ne prunteprenante ion de mensogo.

Ostiĝoj oni ofte konsideras kristaliĝoj.

Kiam milo da homoj diras la samon, tio estas aŭ vox Dei, aŭ granda stultaĵo.

Interparolo de sciencistoj: ili reciproke trafolumadis slipojn en la kapoj.

Adolf Nowaczyński (1876 – 1944)

Inter la plej junaj poetoj estas multaj tiel kapablaj, ke himnojn al la nokto scipovas verki dum tagmezo.

Apud dioj naciaj, fetiĉoj lokaj estas ankoraŭ stultidoloj epokaj.

☘ ☘ ☘

Hundo estas dombesto, kiu de ĉiuj dombestoj la malplej kompetentas pri homoj.

☘ ☘ ☘

Satiristo estas stultulo, kiu por elefanto alĝustigas muskaptilon.

☘ ☘ ☘

Se oni punus grafomanion simile kiel ŝtelon, krimbruligon kaj perforton – historioj de literaturo estus je naŭ volumoj pli maldikaj.

☘ ☘ ☘

Saĝa kiel reĝo Salomono – "kiu eĉ unufoje ne nudigis la glavon, sed nur milon da virinoj".

☘ ☘ ☘

La finaj idealoj de la homa feliĉo estas nur ermitejo aŭ haremo.

Hugo Dyonizy Steinhaus (1887 – 1972)

Pri homo, kiu estas malvasta en sep diversaj specialaĵoj, oni diras, ke li estas ĉiuflanka...

☘ ☘ ☘

Ne estas arto aŭguri pri estonteco; oni devas diveni nuntempo.

☘ ☘ ☘

Al sinjorino, kiu postulas tranĉileton por fruktoj, oni devas rememorigi, ke Eva formanĝis pomon kun ŝelo postrestante stumpon al Adamo.

☘ ☘ ☘

Dank' al atingebleco de klerigo oni povas hodiaŭ legi, verki kaj publikigi ne ĉesante esti analfabeto.

☘ ☘ ☘

Regi estas malfacile: tial saĝuloj volonte cedas ĉi devon al stultuloj – por ili ne ekzistas malfacilaĵoj.

☘ ☘ ☘

Evitu tiun, kiu plendas pro manko de la tempo, li volas preni al vi la vian.

Julian Tuwim (1894 – 1953)

Eĉ la plej belaj piedoj ie finiĝas.

☘ ☘ ☘

Pesimisto asertas, ke ĉiuj virinoj estas prostituistinoj. Optimisto tiel ne opinias, sed esperas.

☘ ☘ ☘

Dura sex, sed sex.

☘ ☘ ☘

Ĵetu feliĉulon al akvo kaj li elnaĝos kun fiŝo en dentoj.

☘ ☘ ☘

Frukton malpermesitan ne mordu per dentprotezo.

Stanislaw Jerzy Lec (1909 – 1966)

Vivi estas tre malsalubre. Kiu vivas, tiu mortas.

☘ ☘ ☘

Kaj kvarpieduloj staras sur malantaŭaj piedoj. Kion oni ne faras por voraĵo kaj pro timo.

☘ ☘ ☘

Li rememorigas al mi pedikon sur kalvaĵo. Ĉirkaŭ multe da brilo, sed tamen pediko.

☘ ☘ ☘

Ĉu vi imagas virinon, kiu permesus al sia amato rakonti dum mil kaj unu noktojn fabeletojn?

☘ ☘ ☘

Diablo ne dormas. Kun iu ajn.

☘ ☘ ☘

Revo: havi tiom da aŭskultantoj, kiom da subaŭskultantoj.

☘ ☘ ☘

Parolu saĝe, malamiko subaŭskultas.

Krakova Societo ESPERANTO

La programo de la renkontiĝoj 2016 j.

3.-05.06. 2016 j. – Jubileaj XXX-aj Esperantaj Tagoj de Krakovo

9. 06. 2016 j. – La organiza kunveno post la XXX-aj ETdK

16. 06. 2016 j. – Lidia Ligęza. Ekzercoj pri tradukado surbaze de ĉiutaga gazeto „Fakto”

23. 06. 2016 j. – Grażyna Porada. La esperantaj lingvaj ludoj

30. 06. 2016 j. – Vizito en Esperanta Rondo de Krzeszowice kun la komuna programo